


# Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2010:6 (nov-dec)

American  
**Esperantist**  
 Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2010:6 (Nov-Dec)



## Ĉi-numere:

- Gender in Esperanto
- Vojaĝe tra Rusujo per la trasiberia fervojo
- Per prepoziciaĵoj, progresu
- Nova krucvorta konkurso
- kaj multe pli...

**Post longa kunlaborado aperas nova, funde reviziita  
 reeldono de *La Eta Princo* (vidu pĝ. 12)**

# Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 49, No 6 — 2010:6 (nov–dec)

Redaktisto • *Editor*: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ bulteno@esperanto-usa.org

📍 Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto (*American Esperantist*) is the newsletter of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your email/postal address, and a closeup photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.



Usona Esperantisto estas la bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, (ret)poŝtadreson kaj foton de via vizaĝo. Kun aliaj fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, loko, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaprigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi al la supra adreso ekzemplerojn de ajna republikigita materialo. Opinioj esprimataj en la bulteno apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.



Centra Oficejo • *Central Office*

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • *Direktoro*, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • *President*: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • *Vice President*: Tim WESTOVER

Sekretario • *Secretary*: Steve BREWER

Kasisto • *Treasurer*: Christopher ZERVIC

Aliaj estraranoj • *Other board members*: George

BAKER, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, ROS Haruo, Tor

KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING,

Julie WINBERG

## Corrections to the 2010 Membership List

Director Bill Harris reports several corrections to the membership list that was sent out for 2010. Please note the following changes:

- Leif Heilberg: correct e-mail address is <vikingsphoto@earthlink.net>
- Dorothy B. Holland: correct telephone number is: 805/967-5241
- Shari Webber-Dunn: mailing name and ZIP: Shari Webber-Dunn, 60888
- Les Kerr: First name should be Les, not Leslie; correct address is : 1020 108th Ave NE Apt 506, Bellevue WA 98004-8667
- Arlyn Kerr: correct address is: 1020 108th Ave NE Apt 506, Bellevue WA 98004-8667; correct call sign is: WB7WDS

## Korespondi deziras

Esperantisto el Hispanujo estas filatelisto kaj volas korespondi pri poŝtmarkoj.

**Alejandro CERVERA, c/ Ramon y Cajal – 4 – Bajo, 46960 Aldaya, Valencia, SPAIN**

## Forpasoj

### Archie BULLINGTON



Kun granda bedaŭro ni rimarkas la forpason en septembro de membro Archie BULLINGTON de Kentukio. Li havis 56 jarojn.

**We need you!** Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_

City & State: \_\_\_\_\_

Postal code & Country: \_\_\_\_\_

Phone & Fax: \_\_\_\_\_

E-mail: \_\_\_\_\_

Birthdate (M/D/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_/\_\_\_\_ Ham radio call sign: \_\_\_\_\_

In the member list, don't publish my:  address  phone  fax  email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

Friend of Esperanto ..... \$10.00  
*(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)*

Youth *(you must be under 27)* ..... \$20.00

Limited Income ..... \$20.00

Individual ..... \$40.00

Family ..... \$60.00

Sustaining ..... \$80.00

Life *(birthdate required)* ..... \$800.00

Credit card info:  Visa  Mastercard

Number: \_\_\_\_\_ Expires(M/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_

Card verification #: \_\_\_\_\_ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*

## Regional events

Here are just a few of the regional events coming up in the next few months. For a more comprehensive list of events worldwide, see <<http://www.eventoj.hu/2010.htm>>.

### Week of December 15

#### **Esperanto-Tago / Esperanto Day**

December 15th, the birthday of Ludwig Zamenhof, marks an event celebrated around the world as "Esperanto Day". Many groups celebrate on the closest weekend, which this year occurs on the 11th–12th or 18th–19th (or both). Check with your local group to find out if they have a special event scheduled!



### December 15 (New York, NY)

#### **Zamenhof Symposium**



The World Esperanto Association (UEA) will be presenting *From Zamenhof to Soros: A Symposium* at UN Plaza in Manhattan. The program includes a celebration of a new biography of Zamenhof and the launch of *Soros in Siberia*,

a memoir by Tivadar Soros (father of George Soros) about his escape from a Russian POW camp after WWI. Presenters include Esther Schor, Ralph Dumain and Humphrey Tonkin. For more info, and to RSVP (preferably by Dec. 10) see <<http://sites.google.com/site/zamenhofsymposium2010>>.

### February 26 – 27 (Louisville, KY)

#### **Seminar on the Literature of Esperanto**

Coinciding with the 39th annual *Louisville Conference on Literature and Culture* at the University of Louisville. Seminar languages will be Esperanto and English. Presenters include Ulrich Becker, Duncan Charters, Humphrey Tonkin and Tim Westover. For more information, see <<http://esperantic.org/en/communications/news?n=26>> or email <[bonnie.fonseca@louisville.edu](mailto:bonnie.fonseca@louisville.edu)>.

## Local groups

Below are contact addresses for some of the larger local groups that meet regularly; for more complete info, see our website.

### California

**Sacramento:** <http://esperanto.org/us/esos>

**San Diego:** <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

**San Francisco:**  
<http://esperanto.org/us/SFERO>

**Santa Barbara:** [dorothyjeanh@gmail.com](mailto:dorothyjeanh@gmail.com)

**L.A.:** <http://fizzylogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

**Colorado** (Longmont) <http://ek-ek.org>

**Connecticut** (Wallingford) <http://esne.net>

**District of Columbia** <http://esperantodc.org>

**Georgia** (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

**Hawaii** (Honolulu)  
<http://esperanto.org/us/Honolulu>

**Idaho** (Boise) <http://terpomuloj.org>

### Illinois

**Champaign-Urbana:** <http://ekoci.org>

**Chicago:** <http://esperanto-chicago.org>

**Maine** (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

**Massachusetts** (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

**Missouri** (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

**New Jersey** (Princeton)  
<http://esperanto-nj.tripod.com>

### New York

**New York:** <http://esperanto-nyc.org>

**Rochester:** <http://esperanto.lodestone.org>

**Ohio** (Cincinnati) <http://ligileto.freeshell.org>

### Texas

**Austin:** <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

**Dallas:** <http://esperanto-tx.org>

**Virginia** (Hampton Roads) <http://bonege.com>

**Washington** (Seattle)  
<http://seattleesperanto.org>

**Wisconsin** (Madison)  
<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

## Instruu en Ĉinujo!

Elementa/meza lernejo en Changzhou (iomete nordokcidenten de Ŝanhajo) volas dungi instruiston dum almenaŭ du jaroj por instrui Esperanton kaj la anglan. Vi havos komfortan sed ne luksan vivon kun multe da helpo. Kapablo iomete uzi la ĉinan helpas sed ne necesas. Interesitoj kontaktu s-ron ZHANG Changsheng, prezidanto de Changzhou Esperanto-Asocio, ĉe adreso <zhchsh56@126.com>, uzante kaj Esperanton kaj la anglan en via mesaĝo. Sendu demandojn pri la posteno al Ron GLOSSOP, <rglossop@mindspring.com>. La retejo por la Esperanto-Asocio de Changzhou estas <<http://www.czea.js.cn>> (klaku butonon por "Esperanto").

— Ron GLOSSOP

## Ĉu traduki pri tervarmiĝo?

Responde al la anonco de Doroteo HOLLAND en numero 2010:5 de *Usona Esperantisto*: Laŭ mi, ne indas traduki la libron de Al GORE en Esperanton, ĉar ĝi, kaj lia agado (inklude lian kompanion por vendi CO<sub>2</sub> kvotojn) demonstras ankoraŭ unu ekzemplon de friponaĵo de jarcento.

Lia agado siavice estas parto de pli granda internacia politika skemo celanta bremsi la industri-evoluintajn landojn kaj "redistribui" ilian prosperon. Por pli da informo, vidu la leterojn en *Resono el Usono*: <http://resonoelusono.com/Leteroj.html>

— Alexander GOFEN  
<[galex@ski.org](mailto:galex@ski.org)>

## Esperanto por la UN

Ekde la komenco de la UN, la membraro devas paroli malmultajn lingvojn, tiujn de la plej fortaj kaj riĉaj landoj. Post la sende-

pendiĝo de ekskolonioj, tiuj novaj membroj devas uzi la samajn lingvojn, ofte la lingvojn de siaj koloniaj mastroj. Tiu sistemo daŭras ĝis hodiaŭ.

*Esperanto por la UN* estas nova organizaĵo kiu reprezentas UEA-n kaj Esperanton en la UN. La celo estas memorigi la membrojn, ke pli egaleca solvo ekzistas. Ĉiun tagon, reprezentantoj de Esperanto por la UN ĉeestas kunsidojn kaj parolas kun la stabo, kun prelegantoj, kaj kun membroj de aliaj neregistaraj organizaĵoj, por ke ili vidu kaj aŭdu nian pli egalecan solvon.

Esperanto por la UN bezonas vian subtenon. Bonvolu kontribui al ĝi kiam vi remembriĝos al Esperanto-USA.

Esperanto por la UN  
Universal Esperanto Association  
777 United Nations Plaza  
Concourse Level  
New York, NY 10017

— Scott PAGE  
<[swpage24@verizon.net](mailto:swpage24@verizon.net)>

### Skribu al *Usona Esperantisto*!

Ni bonvenigas viajn mesaĝojn en la angla aŭ en Esperanto. Leteroj prefere estu ne pli ol 200 vortojn longaj; anoncoj ne pli ol 300. Se necese, la redaktisto koncizigos laŭbezone. Bv. noti, ke aperos nur tiuj mesaĝoj kiuj rekte rilatas al E-USA, al Esperanto, aŭ al la lingvoproblemo ĝenerale. Sendu viajn mesaĝojn al:

**[bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)**



### Vaŝingtoniano centjarigās

*Raportas E. EDDY & M. HAMMERSMITH*

BREMERTON, Vaŝingtonio — Longtempa membro D-ro Harry WEINER festis sian centjaran datrevenon somere de 2010. Kiam ni (Ellen EDDY kaj Mary HAMMERSMITH) unue renkontis lin frue en la 70-aj jaroj, li jam de jaroj uzis la lingvon kaj havis multajn geamikojn en Esperantujo. Ni ĉiam rigardis lin kiel ekzemplon de bona esperantisto kaj li instigis nin studi pli diligente.

Je tiu tempo li loĝis en Aberdeen apud la Pacifika Oceano. Krom lia profesia laboro kiel okulisto, li ankaŭ instruis Esperanto-kurson ĉe *Grays Harbor College*. Li donacis multe da Esperanto-libroj al tiu lernejo kaj oni povis pruntepreni ilin per interbiblioteka pruntado. Tio helpis novajn lernantojn kiuj ne havis multe da mono. Ankorau restas almenaŭ 13 el tiuj libroj por lokaj esperantistoj. D-ro Weiner ricevis atestilon de kompetenteco en 1970 kiu deklaris ke li sukcesis en la *Advanced Examination in Esperanto*. Tiu dokumento estis surskribita de Cathy



Mary HAMMERSMITH kaj Ellen EDDY vizitis kun centjarulo D-ro Harry WEINER en Bremerton, Vaŝingtonio.

SCHULZE, John LEWINE kaj Frank HELMUTH (tiam prezidanto de ELNA).

Ni vizitis D-ron Weiner en lia nuna loĝloko, Bremerton, kie li loĝas en bela domo apud la Puĝeta Fjordo: li en unu parto kaj la familio de lia filo, Jerry en alia parto. Eĉ estas spaco por la familio de la dua filo Mark kiam li vizitas el Kalifornio. Preskaŭ ĉiu muro havis kolekton de artaĵoj pentrita de lia artista edzino Elsie kiu forpasis en 2005. Li estas mirinde energia kaj ni diskutis kelkajn el niaj malnovaj Esperantaj memoroj kaj li montris al ni sian oficejon kun multaj Esperanto-libroj kaj memoraĵoj. Post bongusta tagmanĝo preparita de lia helpanto Lindsay, la suno benis nin do ni povis foti ekstere. Espereble ni povos gratuli D-ron Weiner en 2011 kiam li atingos 101!

### Tre sukcesa NOREK

*Raportas ROS' Haruo*

ANACORTES, Vaŝingtonio — Dek naŭ esperantistoj el Brita Kolumbio, Vaŝingtonio, Idaho, kaj Kalifornio ĝuis agrablan kunvenon en Anacortes kaj la Sanjuana Insularo kiam NOREK 2010 okazis tie, la 17-an-19-an de septembro). La aranĝo komenciĝis per Interkona Vespere, vendredvespere, en la ĉambro de Les kaj Arlyn KERR ĉe la kongreseta hotelo, *Anaco Bay Inn*. Sabaton, ni pasigis preskaŭ la tutan tagon en la insularo, vojaĝante per pramo de Anacortes preter Insulo Shaw ĝis Insulo Orcas, kie nin renkontis David RICHARDSON (kiu loĝas tie), poste reen al Shaw, kaj Lopez, ĝis ni atingis la ĉefurbon de Kantono San Juan, *Friday Harbor*. Tie ni manĝis bonegan



La NOREKanoj ĉe la kajo de *Orcas Landing*

grekstilana tagmanĝon ĉe restoracio *Maloula's* kaj vizitis la Balenan Muzeon. Post revojaĝado ĝis Anacortes, ni vespermanĝis (picon, ĉefe) kaj aŭskultis rakonton de Olga DU TEMPLE (deklamitan de Wally; Olga restis hejme) pri la kialo de la formoj de la arabdevenaj numeraloj. Dimanĉon matene, antaŭ ol foriri, ni spektis tre interesan fotaron de Lottie ERICSON pri ŝiaj spertoj kiel instruisto pri la angla lingvo en Kurdistano (norda Irako) antaŭ nelonge. Post tio, la esperantisto-loganto de Anacortes, Tezio (ekse Mugwort), ĉiĉeronis veturon sur la monteton Cap Sante por rigardi la ĉirkaŭaĵon kaj la urbon. Kaj fine post ĉi ĉio, pli ol duono de la grupo veturis al Oak Harbor, kie ni spektis la teatraĵon *Chicago*, en kiu rolas konata esperantistino Ĵenja BONDELID (pensu pri la skulptistino-filino en *Pasporto al la Tuta Mondo*), kaj poste ni vespermanĝis (denove greke) kun ŝi.

## Instrua vojaĝo al Ĉinujo

Raportas Ronald GLOSSOP

PEKINO, ĈINUJO — Dum kvin semajnoj en aŭgusto kaj septembro, kiel direktoro de la organizo *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*,

mi vojaĝis en Ĉinujo por instrui Esperanton kaj paroli pri Esperanto en sep urboj (Taijuan, Pekino, Dandong, Harbino, Ŝanhajo, Changzhou, kaj Zhenjiang).

La unua afero estis 11-taga seminario en Taijuan en kiu partoprenis 59 instruistoj kaj studentoj. Estis elstare, ke la instruistoj venis ne nur el Ĉinujo sed ankaŭ el Danujo, Japanujo, Koreujo, kaj Usono – kaj unu perskajpe el Nederlando.

Post la seminario mi vizitis la oficejon de Ĉina Radio Internacia en Pekino kie raportisto intervjuis min kaj Profesorinon GONG Xiaofeng, Sekciestro en Ĉinujo por la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Ni tiam veturis al la urbo Dandong por partopreni la 6-an Nordorient-Ĉinan Esperanto-Kongreson, kie mi havis ŝancon instrui klasojn por helpi lokajn esperantistojn plibonigi sian lingvouzon antaŭ la kongreso. Cent kvindek homoj el dek unu provincoj kaj urboj ĉeestis la kongreson, inkluzive de multaj gejunuloj kaj gastoj el Japanujo, Koreujo, kaj Usono. La honora gvidanto de la kongreso estis veterana verkisto kaj tradukisto 88-jara, LI Sen. Okazis multaj prele-



Ron GLOSSOP ĉe lernejo en Ĉinujo

goj kaj programeroj pri la temo “La Instruado kaj Aplikado de Esperanto”.

Post la kongreso kun aktivulo PENG Zhengming el Wuhan mi veturis al la norda urbo Harbino por intense instrui Esperanton ĉe la Instituto pri Scienco kaj Tekniko de Heilongjiang, kaj je la 28-a de aŭgusto mi flugis al Ŝanhajo por prelegi pri “La Signifo de la 21-a Jarcento” ĉe Ŝanhaja Internacia Studara Universitato.

La 30-an de aŭgusto mi veturis trajne al Changzhou por instrui Esperanton kaj la anglan dum kelkaj tagoj en la elementa lernejo. Mi ankaŭ havis ŝancon prelegi anglalingve ĉe universitato kaj informi proksimume cent instruistojn de la angla lingvo pri Esperanto, klarigante al ili kial ĝi estas pli bona dua lingvo por la tuta mondo ol la angla.

La 4-an de septembro mi veturis per trajno al Zhengjian por viziti klason en elementa lernejo kiu jam studas Esperan-

ton sub la gvidado de SHI Xueqin kaj edzo Michel FONTAINE, originale el Francujo. Ankaŭ la gepatroj de la gelnantoj studas Esperanton por prepari por vizito al Francujo venontjare. En Ĉinujo nun ĉiuj infanoj kaj junuloj devas lerni la anglan, sed efektive tiu sperto kun okcidenta lingvo helpas ilin poste lerni Esperanton.

La 6-an de septembro mi reiris per trajno al Ŝanhajo kaj, kun la helpo de esperantistoj tie, iris al la flughaveno por trafi la 13.5-horan flugon ree al Usono. Ĉie en Ĉinujo la esperantistoj multe helpis, tre grava afero ĉar mi ne scipovas la ĉinan lingvon.

La ĉefa ilo de instruado kiun mi uzis en Ĉinujo estas la “Kanto de la Koloroj”. La lasta strofo bone komunikas la bazan ideon de Esperanto: “*Sur la tero, bela tero / Loĝas ni, kantas ni / Kune sur la tero, monda familio*”.



En septembro, konata aŭstralia verkisto Trevor STEELE (*Flugi kun kakatuoj, Kvazaŭ ĉio dependus de mi*) vizitis Novjorkon por prezenti novan anglalingvan libron *The Reluctant Messiah*, ĵus eldonitan de Mondial. Kaj Trevor kaj Katja STEELE estas aktivaj esperantistoj, kaj supre ili rekontiĝis kun membroj de la Esperanto-Societo de Novjorko. Ili trovis vere internacian grupon de novjorkaj esperantistoj el Germanujo, Brazilo, Kroatujo, Usono, Irano, Porto-Riko, Slovakujo kaj Japanujo!



## Tra Siberujo al Mongolujo

*Arnoldo lastatempe vojaĝis per la trasiberia fervojo al la Tutazia kongreso en Ulan-Batoro. Jen parto de lia vojaĝraporto.*

Nia gvidantino Svetlana atendis min ĉe flughaveno en Moskvo. Per serio de trajnoj, koridoroj kaj ŝtuparoj ni atingis komfortan hotelon. En nia grupo mi estis la sola usonano kaj anglalingvano. La aliaj estis ĉefe franclingvanoj, sed laŭ esperanta kutimo estis bunta lingva kaj kultura vario. Nia renkontiĝo kun Moskvo inkluzivis vojaĝon tra deko da metrostacioj, diverse ornamitaj. Unu grupano eĉ kuŝis sur planko por foti plafonon. (Fotado estis tre grava ŝatokupo; dum la vojaĝo, grupanoj diligente fotis ĉion. Bedaŭrinde mi jam perdis mian fotilon survoje al Moskvo!)

Dum longaj promenoj ni vizitis Krem-lon, tombejon Novdeviĉi kaj la apudan monaĥinejon. Unuafoje mi vizitis Moskvon en 1966 kaj denove en 1995 dum postkongresa ekskurso. Mirindaj estas la ŝanĝoj. Elekto de manĝaĵoj kaj vestoj konsiderinde pliboniĝis, sed mankis vendejoj de seriozaj libroj kaj muziko, almenaŭ sur nia marŝvojo. En Kremlo kaj Novdeviĉi ni vizitis preĝejojn neviziteblajn dum miaj antaŭaj vojaĝoj. En la urbo ni vizitis ankaŭ kelkajn imponajn preĝejojn kies dekoracio estis malnovstila sed farita el nova materialo, pro detruo de la malnova dekoracio dum la preĝejoj servis kiel simplaj staploj. Impona estis la nombro de preĝantoj kaj eklezianoj.

Post tri tagoj da streĉaj promenoj, ni entrainiĝis tagmeze ĉe la stacidomo “Kazanj”. Ni adiaŭis al Svetlana, kaj gvidan-



### Arnold VICTOR

Arnoldo estas vojaĝema membro de Esperanto-USA kiu loĝas en Novjorko.

[arvimide@earthlink.net](mailto:arvimide@earthlink.net)

tino Tatjana transprenis gvidadon tra Siberio ĝis Ulan-Batoro.

Dum sufiĉe longaj haltoj, sur la kajoj amasiĝis lokanoj vendantaj diversajn varojn. Mia samkupeano unufoje aĉetis sekigitan fiŝon. Malgraŭ averto de Tatjana li manĝis ĝin, hakante ĝin per utila kaj forta tranĉilo, kiu servis ankaŭ al bezono de ni ne tiel bone ekipitaj samkupeanoj. Unu el ni kunportis korneton kaj amuzis, eĉ surprizis, per sia muziko vizitantojn kaj laborantojn sur la kajoj.

Dum la tuta vojaĝo, la surtrajnaj aŭŝoj estis laŭ moskva horzono. Ni devis lerni kalkuli la lokajn horojn kaj ŝanĝojn tra diversaj regionoj. Post Moskvo ni trapasis vastan regionon, saltante du horojn antaŭen.

Post du noktoj ni atingis Siberion sen rimarkinda ŝanĝiĝo de la arbara pejzaĝo. La unua longa halto estis en Jekaterinburgo, kie mortis la lasta cara familio. Post ankoraŭ unu nokto ni eltrajniĝis frumatene por tranokti en Krasnojarsk. Salutis nin afablaj ĵurnalistoj, kaj niaj intervjuoj pri la lingva problemo kaj novaĵo pri nia ekskurso al Mongolujo aperis en loka televidprogramo.

Krasnojarsk estis efektive la ĉefurbo de Siberio, tamen nun Novosibirsk estas pli granda, kaj servas kiel intelekta centro. Nia hotelo estis apud larĝa rivero Jenisej, unu el la kvar gravaj riveroj de Siberio. Nin atendis matenmanĝo kaj iomete da konfuzo pri mendoj.

Post mallonga ripozo ni vizitis la apudan muzeon de tiu regiono kaj ni daŭrigis la vojon al kultura centro, granda teatro kaj placo. Estis festotago, kaj en parko paradis diversaj grupoj ĉirkaŭ monumento al perditoj en militoj. Poste ni vizitis gastaman restoracion por vespermanĝo kaj amatoreca amuzo per lokaj geesperantistoj. La sekvan matenon ni haltis survoje al la trajno por omaĝi al domo, kiu servis kiel hospitalo por vunditoj dum la dua mondmilito, kaj ankaŭ vizitis librovendejon tiel bone plenumitan kiel la plej bonaj en Moskvo.

Post unu tago, dum kiu okazis halto en Novosibirsk kie kelkaj lokaj esperantistoj salutis nin sur la kajo, ni alvenis al Irkutsk. Post matenmanĝo ni iris al malnova preĝejo kaj al monumento al konstruo de la trasiberia fervojo. Tagmeze pramo portis nin al insulo en lago Bajkal.

Sur la insulo Olĥon atendis nin ampleksa, bongusta vespermanĝo kun muziko de lokano. Elektroprovizo atingis Olĥon-on antaŭnelonge, kaj oni ankoraŭ atendas akvoprovizon. Tagmeze ni haltis ĉe insuleto, sur kies pinto budhanoj lastatempe konstruis sanktejon, nun ornamitan per postlasaĵoj de turistoj kaj piaj pilgrimoj. Estis aliaj tiaj ornamaĵoj en diversaj lokoj sur la insulo. La plej multnombra indiĝena popolo de la regiono estas burjata, parenca al la mongola popolo. Nia gvidantino, burjatino, klarigis, ke la nomo “Baj kul” en la burjata lingvo signifas “sankta loko”, kaj “Olĥon” signifas “seka”.

Lago Bajkal estas la plej granda kaj profunda dolĉakva lago de la mondo, kaj ĝi kreskadas. Enfluas ĝin diversaj surteraj kaj subteraj fluoj, kaj nur unu rivero elfluas. Ties kolizia ligo kun loka rivereto

Irkut donas nomon al urbo Irkutsk (“perturbo” en lingvo Evenki, parenca al la manĉua).

La matenon de nia reveturo al Irkutsk kaj la fervojo, okazis longa promeno ĉirkaŭ unu pinto de la insulo kun piknika tagmanĝo. Survoje al pramo nia burjata veturiganto montris al ni la apenaŭ rimarkindan restaĵon de karcerio, kie punlaboris poloj, litovoj, kaj aliaj kaptitoj de Sovetunio dum la dua mondmilito.

Antaŭ ol atingi la stacidomon, ni haltis ĉe cirko de lagaj fokoj, la solaj freŝakvaj fokoj en la mondo. Post longega programo de ĉiuj eblaj lertaĵoj, ni finfine atingis la trasiberian fervojon por la lasta parto de nia vojaĝo en Rusujo. Meznokte ni trapasis la urbon Ulan-Ude, ĉefurbon de Burjat-Mongola regiono kaj sidejon de tutmonda kunveno de mongola kulturo dum la sekva monato.

Sekvamatenne ni haltis en Nauŝki ĉe la landolimo. La formalajoj de trapaso daŭris la tutan tagon. Estis unu restoracieto, kaj mi sufiĉe regas la rusan por traduki la manĝokarton por diversaj alilingvanoj atendantaj landliman kontroladon.

Nur je la kvara posttagmeze komenciĝis kontrolado ĉe la rusa flanko de la landlimo. Ĝi daŭris du horojn kaj duono kaj postulis precizan plenumadon de formularoj, kontrolon de kupeoj, kaj eĉ leviĝon de koridora tapiŝo por kontroli elirejon sub la vagono.

La sekvan matenon ni traveturis duonon de Mongolujo por atingi Ulan-Batoron. Kongresanoj grandanime akceptis nin kaj per kamionetoj portis nin al diversaj hoteloj. En mia hotelo Ĉingis-Ĥano, estis granda ĉiovendejo kaj diver-

(daŭrigo en paĝo 11)

# Pri la speciala teorio de relativeco

de Barry FRIEDMAN

Dum pli ol 200 jaroj oni kredis, ke la naturon priskribis senerare la moviĝ-ekvacioj de Isaac NEWTON. Kiam unuafoje oni eltrovis en ili eraron, oni eltrovis ankaŭ manieron korekti ĝin. Kaj la eraron kaj la korekton trovis Albert EINSTEIN en 1905.

La rilaton inter forto, maso, kaj akcelo esprimas la dua leĝo de Newton:  $F = ma$ .

Ĝi antaŭsupozas, ke la maso ( $m$ ) de korpo estas konstanta. Tamen oni nun scias, ke maso pligrandiĝas kiam ĝia rapido pligrandiĝas. La formulo de Einstein difinas mason per la ekvacio:

$$m = \frac{m_0}{\sqrt{1 - \frac{v^2}{c^2}}}$$

kie  $m_0$  estas la “ripoz-maso”: la maso de la korpo kiam ĝi ne moviĝas.  $v$  estas la rapido de la korpo, kaj  $c$  estas la rapido de lumo – proksimume 300 000 kilometrojn sekunde.

La ŝanĝoj de Einstein nur enkondukas korektan faktoron por la maso. La pligrandiĝo estas tre malgranda ordinare, kiam rapido ne estas tre granda. Eĉ por satelito, kiu orbitas teron je rapido de kelkajn kilometrojn sekunde, la proporcio  $v^2/c^2$  estas trege eta, kaj preskaŭ ne observebla. Nur je treege granda rapido estas la pligrandiĝo de maso granda.

Tiu efiko estis eltrovita teorie antaŭ ol oni konfirmis ĝin eksperimente. Aliaj homoj kontribuis al la eltrovo, sed Einstein finis ĝin. ★

## Tra Siberujo (daŭrigo de paĝo 10)

saj butikoj. Matenmanĝo estis ampleksa kaj laŭ diversaj kuirartoj korea, mongola, eŭropa, kaj rusa.

La kongresaj kunvenoj inkluzivis omaĝon al forpasintaj azianoj, mongolan lingvon kaj kulturon, kaj organizajn aferojn. Tre impona estis grupa vizito al armea teatro por prezentado de armea artistaro. Temas pri tre lertaj dancistoj, muzikistoj, kantistoj, kaj akrobatoj. Mi salutis la malferman kunvenon nome de Esperanto-USA kaj la novjorka societo.

Inter multaj prezentantoj ĉe internacia vespero kantis Kim HENRIKSEN el Danujo, kaj prezentis diversajn muzikilojn HORI Jasuo el Japanujo. (Kim regalis nian landan kongreson en Bostono kaj atendeble koncertumos dum la sekva UK en

Kopenhago.)

Post la kongreso mi partoprenis ekskurson al diversaj lokoj ĉirkaŭ Ulan-Batoro. Ni haltis en kampadejoj kaj loĝis en tradiciaj tendoj, tamen kun elektra lampo anstataŭ fajro. Ĉie estis ampleksa elekto de trinkaĵoj kontraŭ pago. Ni vizitis metiartejon, randon de la dezerto Gobi, kanjonon en kiu galopis restarigita aro de mongolaj ĉevaloj, templon grandparte ruinigitan dum soveta kontraŭreligia militago kaj poste restarigitan. Ni pasis la lastan tagon ankoraŭ en Ulan-Batoro, regalataj en mongola kaj korea restoracioj.

Mi flugis al Pekino por tranoktado kaj revenis hejmen je la sekva tagmezo.

Jen mia plej longa vojaĝo en Esperantujo, kie multaj diversaj aventuroj atendas ankaŭ vin. ★

## Princo eta, laboro ega

Aperis ĉi-somere nova, tria, Esperanta eldono de *La Eta Princo* de Antoine DE SAINT-EXUPÉRY. Kuneldonis ĝin Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kaj Espéranto-France (EF).

Kiam en 2009 KEA konfidis al mi la taskon prepari novan Esperantan eldonon de la libro, mi tute ne antaŭvidis, kiom grandan laboron tio fakte postulos. Necesis entute 14 monatoj kaj diversaj fazoj de laborego por finpretigi la libron. Sed fino bona, ĉio bona: la finpresita libro estas pli bela ol ni eĉ esperis! Samtempe, pro la granda kvanto da presitaj ekzempleroj – pli ol 2500, vere eksterordinara kvanto por Esperanta eldonaĵo – ĝia prezo malaltas: nur 12 eŭroj, t.e. proksimume 16 dolaroj.

La dua Esperanta eldono, eldonita en 1984 de KEA, elĉerpiĝis ĉirkaŭ la jaro 2000. Daŭre alvenis mendoj el la tuta mondo, ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de kolektantoj. Ja necesis nova eldono, sed mankis la impulso efektive realigi ĝin. Finfine, tamen, naŭ jarojn poste, la projekto ekis. Jen pliaj detaloj pri kelkaj el ĝiaj supre menciitaj fazoj.

**La teksto.** Ni havis ĝin en elektronika formo, sed sur disko hodiaŭ ne plu legebla. Ni trovis tamen kontraŭleĝan retan version de la 2-a eldono. Mi elŝutis ĝin, sed ĝi plenigis je tajperaroj. Nur elsarki ilin, komparante kun la presita versio, vorton post vorto, estis sufiĉe granda laboro.

**Reviziado.** La unua Esperanta eldono de la libro aperis en 1961. Tradukis ĝin Pierre DELAIRE (1919–1985), grava tiama franca esperantisto, hodiaŭ preskaŭ forgesita (vd. la vikipedian artikolon pri



**François LORRAIN**

Francisko estas sociologo kaj matematikisto, nun emerita. Li loĝas en Montrealo, Kanado.

[francisko.lorrain@mac.com](mailto:francisko.lorrain@mac.com)

li). Ĉar la dua eldono, tiu de 1984, enhavis tekston jam funde reviziitan de Delaire mem, mi esperis, ke mallonga reviziado sufiĉos. Kiel mi eraris!

Mi trovis ie kaj tie malĝustajn vortojn (ekz. *gajnas* anstataŭ *perlaboras*, *fulardo* anstataŭ *koltuko*, *rustitaj* anstataŭ *rustiĝintaj*). Krome, kvankam la Delaire-a traduko multloke bonas, ĝi, same multloke, stile iom lamas. Rea funda reviziado necesis.

Mi starigis tri-homan revizian komitaton: Marc BAVANT (Francujo), Davor KLOBUČAR (Kroatoj) kaj mi (Kanado). Gravis, ke la komitatoj ne estu ĉiuj franclingvanoj. Ni multe laboris kaj diskutis dum kelkaj monatoj.

Dum tiu tempo, kompreneble, mi zorge komparis la Delaire-an tradukon, frazon post frazo, kun la franca originalo, kaj trovis multajn aliajn korektendaĵojn: lokojn, en kiuj Delaire miaopinie iom malfidelis al la originalo. En ĝi mi trovis krome dekon da frazoj ne tradukitaj de Delaire!

Traduki *La Etan Princon* estas kvazaŭ traduki la Bibliion. Ĝi estas mondliteratura ĉefverko, ege konata kaj legata ĉiulande. Ne akcepteblas ajna traduko redonanta la sencon en bona Esperanto. Ĉiu vorto gravas. Interpunkcio gravas. Oni ofte devas atente studi la tekston por kontentige traduki ĝin. Interalie, necesas ĉiam zorgegi pri vortoj kaj esprimoj ripe-

tiĝantaj en la originalo, cerbumante, ĉu tiuj ripetigoj estas hazardaj aŭ, male, volitaj de la aŭtoro; pri tio multe helpas la komputilaj serĉiloj.


En kelkaj kazoj, en kiuj ni ne tuj trovis akcepteblan solvon, mi konsultis diverslingvajn tradukojn de la verko, por vidi, kiel aliaj tradukistoj elturniĝis.

Finfine, tamen, iun tagon, la komitato alvenis al fina teksto.

**Postrevizia kontrolado.** Pro la granda malfacilo de tia revizia laboro, mi poste sendis nian reviziitan tekston al tri aliaj spertuloj, Ginette MARTIN (Francujo), Simon DAVIES (Britujo) kaj Donald BROADRIBB (Aŭstralio), por *postrevizia kontrolado*, kiu same daŭris kelkajn monatojn.

Ĝi estis tute ne superflua kaj multe plibonigis la tekston. Mi denove komparis ĝin kun la franca originalo. Tion faris ankaŭ Davies, kiu atentigis min pri multaj etaj tradukaj malfidelecoj restantaj en nia teksto. Denove granda laboro, sed valorega, eĉ nepra.

**Multflanka korespondado.** Mi dume konsultis plurajn esperantistojn pri diversaj tradukaj problemoj. Ekzemple: ĉu la ĉapitronumeroj estu en romiaj ciferoj (kiel en la originalo) aŭ en arabaj? Kiel oni traduku la fervojajn fakesprimojn en ĉapitro 22? Kiel oni traduku la francan komunuzan esprimon *grande personne* (ekvivalentan al *grown-up* en la angla)? Pri ĉi-lasto demando, Delaire uzis la paŭsaĵon *grandpersono*, sed ni finfine elektis la vorton *grandulo*, interalie ĉar ĝi malas al *etulo*. Entute mi interŝanĝis pli ol 800 mesaĝojn kun pli ol 50 korespondantoj el pli ol 20 landoj. Tiu reeldono estas ja belega ekzemplo de internacia kunlaborado!



Francisko prezentas la libron kun Normando FLEURY ĉe la Aŭtuna Renkontiĝo (ARE) en oktobro.

**Grafiko.** Por bele pretigi tian libron, enhavantan multajn ilustraĵojn, vere necesas sperta grafikisto, ne nur por kompetente enpaĝigi la libron – kio ne estas tiel simpla afero, kiel oni pensus, eĉ se ne estus desegnoj – sed ankaŭ por taŭge trakti la bildajn dosierojn, rilate koloron ktp.

**Diskutoj.** Pri la multaj diskutoj ene de KEA kaj kun EF, ĉefe zorgis Normando FLEURY, konata montreala aktivulo, kiu kunordigis la tutan projekton. En EF plej aktivis Bruno FLOCHON, kiu rekomendis al ni francan presiston, kiu elstare altkvalite presis la libron. Fleury kaj Flochon kune zorgis pri la interasociaj intertraktoj por kuneldoni la verkon, kaj pri la diskutoj kun la franca eldonejo Gallimard.

**Tajperaroj.** Vi certe rimarkis, ke en multaj Esperantaj eldonaĵoj, eĉ modernaj, troviĝas hontinde multaj tajperaroj! Tion oni eble povas kompreni: plejparte tiuj libroj estas senpage eldonataj de bonvolaj amatoroj, multaj el kiuj, ŝajne,

(daŭrigo en paĝo 17)

## Gender in Esperanto

Many languages burden students with the need to memorize arbitrary grammatical gender. Someone learning German, for example, is forced to remember that a large body of water can be a masculine *Ozean*, a feminine *See*, or a neuter *Meer*, and that the noun *Mädchen* (girl) is neuter—because all nouns ending in the diminutive suffix “chen” are neuter.

English and Esperanto grammar spare us this trouble. The only residual gender is found in the third person singular pronouns, where we distinguish between *li*, *ŝi* and *ĝi* or *he*, *she*, and *it*. Both languages are often said to use “natural gender,” that is, only humans and certain animals are referred to as “he” or “she,” and everything else is “it,” excepting only poetic or metaphorical usage (calling a ship a “she” or the like).

Odd as it might seem to us, some languages (e.g., Finnish) go even farther and use the same pronoun to mean both “he” and “she.” But however gender-neutral their grammars, I’m pretty sure that all languages have at least some sex-specific words in their vocabularies.

In English we sometimes apply separate names to male and female animals. A horse can be a *stallion* or a *mare*, a hog a *boar* or a *sow*, a sheep a *ram* or a *ewe*, a chicken a *rooster* or a *hen*, etc. In the case of bulls and cows we even lack a singular noun embracing both. Sometimes we have a distinctive word only for the female of the species, such as *lioness* and *tigress*.

(Supposedly P. T. Barnum reduced dawdling in his New York museum by putting a sign on a door reading “This



### D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

[dgarygrady@frontier.com](mailto:dgarygrady@frontier.com)

way to the egress.” People thinking they were going to see an exhibit about some female creature were surprised to find themselves outside.)

A century ago, English often made a distinction between male and female professional titles, so that a woman might be referred to as *authoress* or a *poetess* or *doctress*. This is much less common in modern English, with *actress* being perhaps the only remaining example in common use (and even it seems to be in decline). One reason for the change is the movement toward equal rights for women. Adding a feminine suffix can be taken to imply an irrelevant or even dismissive distinction. Why not simply call an author of either sex an *author*? And if you do draw a distinction, why should the base word be masculine and the derived one feminine?

This brings us to the Esperanto suffix *-in*, which troubles some students for the same reasons. Why indeed should all the sex-specific words in Esperanto be masculine by default? Why do we derive the word *patrino* from *patro* and *virino* from *viro*? Why not make the base word gender neutral and employ suffixes for both male and female?

This strikes me as a valid complaint. After all, Ido manages to avoid a gender bias by treating most almost all noun roots as neuter, deriving masculine words as needed with the suffix *-ul* and using

-in as in Esperanto, so for example the Ido words for “brother,” “sister,” and “sibling” are *fratulo*, *fratino*, and *frato*. The only Ido nouns with inherent gender are *viro* (man), *muliero* (woman), *patro* (father), and *matro* (mother).

There have been proposals to introduce something similar into Esperanto, but they have not caught on. The problem is that while Esperanto came into existence as a planned language, it is today a naturally evolving one, and it can no more be re-engineered from on high than can English. In fact, a number of so-called “natural” languages (Icelandic, for example) are far more regulated than Esperanto is in practice. Imposing a complete reworking of gender in Esperanto is about as practical as completely reforming English spelling.

This is a point worth emphasizing, because Esperanto is so often described as a “constructed,” “planned,” or “artificial” language, which has not been a really accurate description for decades. (As early as 1922 a League of Nations report on Esperanto made the point of calling it a “living language.”)

On the other hand, just as English has gradually become more gender-neutral in response to objections, so has Esperanto. Nouns referring to professions and to animals are increasingly treated not as implicitly masculine but as neuter, with an *-in* suffix or a *vir-* prefix used only when the distinction is relevant. In practice, at least based on my own observations, only a relative handful of words—*viro*, *knabo*, *patro*, *avo*, *onklo*, *frato*, *nevo*, *nepo*, and perhaps a few others—are still treated as invariably masculine.

It’s worth pointing this out to students not just because it helps address the concerns they might have about a supposed gender bias in Esperanto, but because it’s necessary to the understanding of written Esperanto from various decades.

It might also be worth noting that other languages are far less gender-neutral than modern Esperanto. French grammar virtually imposes sex-specific distinctions for the names of professions, for example, with the feminine word usually derived from the masculine. In Spanish, *niños* (literally the plural of *niño*, “boy”) means not just “boys” but also “boys and girls.” Esperanto, of course, has always referred to a mixed group as *geknaboj*.

In short, while complaints about Esperanto’s treatment of gender are probably less common than they were a few decades ago, there’s no reason not to address the topic, in part because it’s something worth knowing in its own right, and in part because it points out that Esperanto isn’t sterile and artificial as some think, but rather a language that changes and develops in active use just like English.

### A Request

In a future column I’d like to address the subject of memory aids for learning Esperanto, such as Butler’s advice to remember the difference between *muso* (mouse) and *muŝo* (fly) by picturing the circumflex in the latter as the fly’s wings. For example, is there an easy way to remember which is which in the set *tablo*, *tabelo*, and *tabulo*? What about the distinction between *-ig* and *-iĝ*? Feel free to send ideas to my new email address, <dgarygrady@frontier.com>. ★

## Per prepoziciaĵoj, progresu

Kiam mi unue eklernis Esperanton, mi provis traduki ĉiun frazon kiun mi renkontis laŭvorte al la angla. Ordinare tio estis surprize facila, sed kiam adverbo rolis en la frazo, la rezultoj estis okulfrape strangaj: *Estas facile danci* fariĝis *Is easily to dance*, kaj *Mi havas multe da libroj* fariĝis *I have manyly of books*. Finfine mi rezignis pri laŭvortaj tradukoj, kaj provis kompreni la signifojn de tiaj frazoj per pli liberaj tradukoj: *Estas facile danci* fariĝis *It is easy to dance*, kaj *Mi havas multe da libroj* fariĝis *I have a lot of books*. Tiam mi ekkomprenis, ke la plej natura maniero esprimi ion en unu lingvo povas esti tute malsimila al tio en alia lingvo, kaj ke por vere regi duan lingvon, oni devas iasence “forgesi” pri tio, kio estas natura en la denaska lingvo, kaj ekuzi tiujn esprimojn kiuj estas naturaj en la lernata lingvo.

Unu grava aro de esprimoj kiuj estas tre naturaj en Esperanto malgraŭ tio, ke ili ne rekte tradukeblas alilingven, estas la tiel nomataj prepoziciaĵoj. Prepoziciaĵo konsistas el adverbo kaj prepozicio kiuj kune funkcias kvazaŭ nova prepozicio. Ĉi-sube mi klarigos kelkajn oftajn prepoziciaĵojn kun *de*, *al*, kaj *kun*.

La prepoziciaĵoj kun *de* estas laŭ mia takso la plej multnombraj. Ili inkluzivas multajn esprimojn kiuj indikas lokon aŭ momenton: *dekstre de*, *maldekstre de*, *komence de*, *meze de*, *fine de*, *norde de*, *oriente de*, *sude de*, *okcidente de* ktp. Plej ofte la signifoj estas tre facile kompreneblaj. Ekzemple, se io troviĝas aŭ okazas *fine de* iu strato, rakonto, aŭ jaro, ĝi troviĝas aŭ okazas *je la fino de* tiu strato, rakonto, aŭ jaro. Malfacilaĵoj povas



**Steven CYBULSKI**

Steĉjo estas fervora gramatikemulo. Li nun loĝas en Madisono, Viskonsino.

[stcybulski@gmail.com](mailto:stcybulski@gmail.com)

tamen ekesti kiam oni uzas la prepoziciaĵojn formitajn el la kompasdirektoj, ĉar malkiel la aliaj supre menciitaj prepoziciaĵoj, ili estas dusencaj. Se mi staras *dekstre de* domo, tre verŝajne mi estas ekster la domo ĉe ĝia dekstra flanko, sed se iu diras, ke loko kiun vi ne konas situas *sude de* Usono, vi ne povas scii ĉu la loko estas en la suda parto de Usono aŭ ekster Usono, pli-malpli proksima al la suda landlimo. Kiam oni uzas ĉi tiujn prepoziciaĵojn, oni estu certa ke la kunteksto ne ebligas dubon pri la signifo.

Ofte uzata prepoziciaĵo kiu unuavide ŝajnas tre stranga al anglalingvanoj estas *kadre de*. La vorton *kadro* oni uzas por nomi tiujn tipe kvadratajn strukturojn kiuj ĉirkaŭas fenestrojn, pentraĵojn, ktp. Oni povas anstataŭigi la prepoziciaĵon per *en la kadro de*, sed tio ne klarigas la signifon de la frazo *Johano faris la KER-ekzamenon kadre de granda Esperanto-aranĝo*. Esperanto-aranĝoj ja estas multmaniere priskribeblaj, sed sendube ili ne aparte similas al fenestroj, pentraĵoj, aŭ aliaj aferoj tiaj. Kial do oni uzu *kadre de* ĉi tie? Efektive, *kadro* ne estas la nomo nur de objekto trovebla en domoj kaj muzeoj, sed ankaŭ de ajna kunteksto aŭ aro de cirkonstancoj kiuj ĉirkaŭas ion. Estas tiu ĉi multe pli vasta senco de la vorto kiun oni celas per *kadre de*. Do, en la supre citita frazo, Johano faris la KER-ekzamenon kiu estis ligita al granda



Esperanto-aranĝo. *Kadre de* estas aparte utila kiam oni volas atentigi pri tia ligiteco: ĉi-kaze, la ekzameno ne estis nur *dum* la aranĝo (eble en alia urbo aŭ eĉ lando), sed *kadre de* la aranĝo (do, ĝuste tie, en la cirkonstancoj kiujn implicas “granda Esperanto-aranĝo”).

Tre multaj estas ankaŭ la prepoziciaĵoj kun *al*. Per *responde al*, oni povas tre koncize klarigi ke io ja estas respondo. Tio ĉi estas iafoje necesa ekzemple dum konversacioj inter multaj homoj, kiam oni ne ĉiam tuj respondas al demandoj. Se mi diras ion *responde al* via demando, tio, kion mi diras, estas mia respondo. *Cele al* estas uzata por montri la celon de iu ago; se oni kelkfoje lavas veston *cele al* la forigo de makulo, la forigo de la makulo estas la celo de tiu lavado. Indas menciigi, ke oni ofte anstataŭigas la vorton *al* en prepoziciaĵoj per N-finaĵo: *responde vian leteron* estas same bona kiel *responde al via letero*.

Kvankam nur kelkaj ekzistas, prepozi-

ciaĵoj kun *kun* estas inter tiuj kiujn mi plej ofte uzas. *Kompare kun* estas utila kiam oni volas priskribi relativan econ de iu afero. Per la frazo, *Kompare kun aliaj lingvoj*, *Esperanto estas tre facila*, oni atentigas pri tio, ke la facileco de Esperanto ne estas absoluta, sed tute evidentiĝas nur kiam oni komparas Esperanton kun aliaj lingvoj. *Kunlabore kun* kompreneble estas uzebla por indiki kunlaborantojn. Se iu organizaĵo planas eventon *kunlabore kun* alia organizaĵo, ambaŭ organizaĵoj partoprenas en la planado; ili kunlaboras unu kun la alia.

Vi certe renkontos prepoziciaĵojn kiujn mi ne klarigis ĉi tie. La ĉiam konsultinda *Reta Vortaro* ĉe <<http://reta-vortaro.de>> ofte difinas ilin, do turnu vin tien se la signifo de iu prepoziciaĵo restas mistero post iom da cerbumado. Se vi ankoraŭ ne faris tion ĉi, mi esperas ke vi nun povos iom post iom ekregi la prepoziciaĵojn, kaj tiel progresi al pli natura uzo de nia lingvo. ★

## La Eta Princo (daŭrigo de paĝo 13)

ne konscias, ke, por forigi tajperarojn el libro, devas atentege trakribi ĝin du, tri, kvar spertaj homoj. La nun ekzistantaj aŭtomataj Esperantaj korektiloj certe ankoraŭ ne sufiĉe maturiĝis; ili kaptas preskaŭ nur tiujn erarajn vortojn, kiuj kontraŭdiras la principojn de Esperanta vortfarado. Ili ne multe helpis por nia eldono. Ili eĉ oftege konsideris eraraj vortojn tute ĝustajn. Sed eĉ bonega korektilo, kontrolanta ankaŭ la gramatikan strukturon de la frazoj, ne kaptos ĉiujn erarajn vortojn. Vorto povas esti ĝusta morfologie kaj gramatike, sed malĝusta sence. Ekzemple, la korektilo ne reagas,

se en la antaŭa frazo starus *gusta* anstataŭ *ĝusta*. Kiel ajn bona la korektilo, tamen devas funde tralegi la tekston kelkaj homoj!

Nu, ĉu nia *Eta Princo* sentajperaras? Tiom da homoj ja trakribis la tekston, ke mi aŭdacas esperi, ke ĝi estas sen ajna tajperaro. Mi konscias tamen, ke tajperaroj estas diabla afero, kaj ke eble restas unu aŭ du. Por ekscii, ĉu mia espero pravas aŭ ne, *mi ofertas dek-dolaran premion por ĉiu nove trovita tajperaro!* Do ek al la libro! ★

*Kvankam la libro ankoraŭ ne haveblas en la libroservoj de E-USA aŭ UEA, eblas tamen mendi ĝin rekte de KEA. Por detaloj, skribu al <[libroservo@esperanto.ca](mailto:libroservo@esperanto.ca)> —Red.*

# enigma

Unu solvinto ricevos \$10-rabaton de la libroservo de E-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) **antaŭ la 2-a de januaro**. Gratulon al la gajninto de la lasta enigmo **Ray REDD!** Laŭrojn al ankaŭ la aliaj solvintoj, Olga DU TEMPLE, Ellen EDDY, Keneĉjo GOLDBERGO, Vilĉjo HARMON, Walter MURAWSKI, Ŝajo MOR, Peter MCCORQUODALE, E. James LIEBERMAN kaj Neal MCKOWN.

## Horizontale

- 1 \*Pagil'  
 4 Skribi per maŝino  
 9 "En bona ordo \_\_\_\_\_ la pordo!"  
 12 Daŭre  
 13 "Kuŝi", bible  
 14 \_\_\_urbo: nek urbo nek bakajo, sed legomo  
 15 "Unu \_\_\_\_\_ la glason plenigas."  
 17 Striita kvarpiedul'  
 18 Cerbŝirmil'  
 19 Atomnumero de hidrargo  
 21 Sinsekvo inter F kaj Ĥ  
 23 \*Plurpersona seĝ' kun dikaj kusenoj  
 24 Adverbo sendubiga  
 26 Miksaj' de konfuzaj sonoj  
 29 Venko en la ludo "Tri en Vico"  
 31 Malfeliĉ' granda kaj daŭra  
 33 Unu, por Ulrich

1	2	3		4	5	6	7	8		9	10	11
12				13						14		
15				16						17		
18						19		20				
21				21		22		23			24	25
26	27	28		29		30		31		32		
33				34		35		36		37		
38				39		40		41		42		
43				44		45		46		47		
48				48		49		50		51	52	53
54	55				56		57					
58				59						60		
61				62						63		

- 35 Hebredevena gentan'  
 37 Prov' fari ion malgraŭ eblo de malsukceso  
 38 \*Stultul'  
 40 "\_\_\_\_ da malvero ne estas danĝero."  
 42 Sincere respekto-plena al Dio kaj religiaĵoj  
 43 Mi + vi  
 44 "Kie \_\_\_o ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas."  
 46 Musĉasant'  
 48 Helpe havigos ion al iu  
 50 Malakcept' de aŭtoritato  
 54 Difavor'  
 56 Plaĉa per sia nevulgareco kaj alta kvalito  
 58 Arbusta baril'  
 59 "Kiu langon ne \_\_\_\_\_, mem sin malbenas."  
 60 "Se en \_\_\_\_\_ io sidas, vizaĝo perfidas."  
 61 Alpreni novan kvaliton

- 62 Pren' el du aŭ pluraj pro prefero  
63 Sufiks' aldonebla al ĉiu stelmarkita solvo, kreante novan radikon kun malsama senco
- 9 Konferenco por ĉiuj kalifornianoj (ml.)  
10 Forĵetaĵ'  
11 Malnova angla unu' de termezuro, ankoraŭ uzata en Usono

## Vertikale

- 1 Artefarita vizaĝ'  
2 Flaritaĵ'  
3 "Lupo ŝanĝas la harojn, sed \_\_\_\_\_ farojn."  
4 Kiam la koko krias  
5 "Ni \_\_\_\_\_ nin frate, sed ni kalkulu akurate."  
6 Simbolo de etega kvanto  
7 Laŭ ne preciza takso (ml.)  
8 Signo kontraŭ VIII, sur ciferplato
- 16 Reĝisoro LEE de la kinajo *Brokeback Mountain*  
17 Agrabla, milda vent'  
20 "En \_\_\_\_\_ de pendigito pri ŝnuro ne parolu."  
22 Alvoka ekkrio por 41-vertikale  
24 Malnei  
25 \*Havanta formon de cirklo-parto  
26 Tradukinto de *La Faraono* Kazimierz  
27 Esprimi gajon, voĉe

## Solve el 2010:5: Juvelŝtonoj

1. Ametisto      6. Opalo  
2. Rubeno      7. Safiro  
3. Diamanto      8. Turkiso  
4. Onikso      9. Agato  
5. Karbunkol'      10. Smeraldo

La kaŝita frazo: **ARDO KOSTAS**

- 28 Konfederaci' aŭ alianc' (ekzemple sovet- aŭ eŭropa)  
30 Jes, por Jacques  
32 Komputila sufikso rilate al densigo  
34 \*Izola stat'  
36 Havena basen' por ŝipoj  
39 \*Ŝakpec' kiu ne moveblas oblikve  
41 Hom' kiu foje troviĝas ĉe 36-vertikale  
45 Imitindaĵ'  
47 Spasm' vizaĝa
- 48 Junul' nobela; fant'  
49 "Agrabla estas gasto, \_\_\_\_\_ longe li restas."  
51 Kuiru panon  
52 Atmosfer', figure  
53 Gut' de l' okulo  
54 Sinsekvo apud "4" sur telefonoj usonaj  
55 Monarĥ'  
57 Rezina surkovril'  
59 \*Kafeinhava trinkaĵ', nigra aŭ foje verda

## Limeriko-rubriko

Jen alia enigmo de Russ WILLIAMS, ĉi-foje pri klasika filmo muzika:

**Bukowski fariĝos soldato  
sed festas unue sur strato.  
Okazas permuto,  
jen Berger rekruto:  
alia milita misfato.**

La solvo aperos venontnumere.

## ĈU ANKAŬ VI VOLAS IĜI DELEGITO DE UEA?

**Se vi jam estas membro de UEA dum unu jaro kaj plenumas la ceterajn devojn, vi povas iĝi Delegito, Vicdelegito, Junulara Delegito aŭ Faka Delegito de ĝia Delegita Reto.**

Plenigu la respondilon en la Reto Jarlibro aŭ elŝutu tiun ĉe [www.uea.org/asisto.html](http://www.uea.org/asisto.html), plenigu ĝin kaj sendu al via ĉefdelegito. Nur se mankas ĉefdelegito en via lando, sendu la plenigan respondilon al la Centra Oficejo.

**ALIGU AL NIA RETO!**

# New in the E-USA bookstore

All items listed here can be ordered online at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>> or by mail from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**. More complete descriptions can be found at our website. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.



**EO MINI GRAMMAR**  
**Esperanto-Asocio de Britio**  
Alphabetic listing of roots, affixes, endings and correlatives. Lots of clear, non-technical examples. If grammar bores (or scares) you, this is a good book to start with.

Softcover. 64 p. 2010. Britain. **\$3.10**



**ZAMENHOF –**  
**BIOGRAFIA SKIZO**  
**Aleksander KORJENKOV**  
Mallonga biografio de la iniciatinto de Esperanto. Mola bindaĵo. 64 p. 2010. Rusujo. **\$10.80**



**SANKTA BIBLIO**  
**British and Foreign Bible Society**  
Jen la Malnova Testamento tradukita de Zamenhof kaj la Nova Testamento kaj Duakanonaj Libroj tradukitaj de komitato de protestantoj.

Mola bindaĵo. 225 p. 1926. Britujo. **\$21.00**



**ORIGINO DE SPECIOJ**  
**Karolo DARVIN**  
La teorio prezentita en tiu ĉi verko radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Eĉ nun la libro restas leginda por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de evoluo.


Mola bindaĵo. 431 p. 2009. Belgujo. **\$40.40**



**DEK GAZETOJ**  
**Aleksander KORJENKOV (Red.)**  
Mallonga resumo pri dek gazetoj gravaj en la movado. Bonega enkonduko al revuoj por komencantoj. Mola bindaĵo. 31 p. 2010. Rusujo. **\$8.20**



**DEK LIBROJ**  
**Aleksander KORJENKOV (Red.)**  
Mallonga resumo de dek libroj gravaj en la movado. Bonega enkonduko al la movado por komencantoj. Mole bindita. 31 p. 2010. Rusujo. **\$8.20**



**ĈASHUNDO DE LA BASKERVILOJ**  
**Arthur Conan DOYLE**  
Tradukis el la angla William AULD. Unu el la plej famaj rakontoj pri la detektivo Ŝerloko HOLMSO. Mola bindaĵo. 167 p. 2010. Rusujo. **\$27.00**



**BONA ESPERO – IDEALO KAJ REALO**  
**Roman DOBRZYŃSKI**  
Ilustrita historio de la bonfara esperantista institucio *Bona Espero*, verkita baze de interparoloj kun Ursula kaj Giuseppe GRATTAPAGLIA. Mal-mola bindaĵo. 256 p. 2008. Slovaĵujo. **\$25.00**